WIKIPEDIA

Sunda lingvo

Sunda lingvo	
Parolantoj	27 000 000
Skribo	latina alfabeto, alfabeto de sunda lingvo
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	su
ISO 639-3	sun
Glottolog	sund1251
Angla nomo	Sundanese
Franca nomo	sunda

La **Sunda lingvo** (en la denaska lingvo **Basa Sunda,** lit. lingvo de Sunda) estas parolata de ĉ 42 milionoj da parolantoj (15% de la tuta indonezia loĝantaro) en okcidenta parto de la insulo Javo kaj en la provinco Banteno. Ĝi apartenas al la grupo de malajopolineziaj lingvoj, subgrupo de la aŭronezia lingvaro, kaj inkluzivas pluraj dialektojn nomatajn laŭ la regionoj de iliaj parolantoj de kiuj la ĉefajj estas

- Bogor
- Priangano, parolata en la plej granda provinco kun la sama nomo, estas la ĉefa dialekto de la sundana kaj estas instruata de la unua ĝis la naŭa grado. Nuntempe la sundana lingvo uzas la latinan alfabeton, kvankam ekzistis/as diversaj aliaj skriboj por ĝi. Ĝia ISO-kodo estas*su*. Ekzistas Vikipedio en la sunda lingvo.

La lingvovarianto cirebona (Cirebon) ne estas sunda, sed java lingvovarianto.

La plej antikva dokumento redaktita en la sundana ĝis nun konata estas la surskriboj (*prasasti*) "de Astana Gede" aŭ "de Kawali", malkovritaj en la vilaĝo de Kawali, okcidenta Javo. Ili nombras ses kaj estas skribitaj per la malnova sundana alfabeto, nomata "kaganga".

Bibliografio

Viviane Sukanda-Tessier: *Parlons soundanais - Langue et culture sunda* - L'Harmattan, 2007 (ISBN 978-2-296-02364-2)

Disvastigo de la lingvoj sur la indoeziaj insuloj Javo, Balio kaj Maduro



Lingva mapo de okcidenta Javo

Eksteraj ligiloj

(eo) Tradukitaj literaturaĵoj en la sunda lingvo (https://www.esperanto.be/fel/publika/012402p.php)

(en) Sunda lingvo, en; Languages of the World, Ethnologue.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Sunda_lingvo&oldid=6980991"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 12:25, 15 jun. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.